


BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



59a jaro n° 3
majo - junio 1967

Sonorilo


dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL DURWAEL IVO ISCRELIANT ROGER

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBRUYNAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DRO DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTO ŜAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRAETEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE ROOVER R., LUCHTVAARTSTRAAT 28 BORGERHOUT TEL. (03) 3942 94

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

PAULUS RAYMOND, 73, RUE DE MONTIGNIES, CHARLEROI

KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

poŝtkonto de B.E.F. : 1634 34 RAAPSTRAAT 72, GENT

Ĉefdelegito de universala esperanto-asocio

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
p.k. 9051 25

49-a kongreso de B.E.F.

13/15.5.1967

Raporto

Charleroi

Sabaton, la 13an je la 14a h. la kongreso malfermiĝis.

En la granda impona halo de la Universitato de la Laboro la diversaj LKK-anoj laboreme deĵoris malantaŭ la diversaj giĉetoj kaj disdonis la kongresajn dokumentojn al la alvenintaj gekongresanoj.

Samtempe la speciala poŝtoŭficejo ekfunkciis kaj altiris tuj parton de la ĉeestantoj kiuj volis aĉeti la belajn ilustritajn kolorpoŝtkartojn (kun Esperanto-teksto) kaj kun la speciala stampo de la kongreso.

La administrantara kunsido de BEF, kiun prezidis S-ro Jaumotte, ĝenerala prezidanto, (sufiĉe malsaneta), estis dediĉata al la propagando kaj la pli efika laboro kiun la komitato povos fari en baldaŭa estonteco. Dume la aliaj gekongresanoj, sub lerta gvidado de F-ino A. Orsolini, vizitis la Nacia(n) Instituto(n) de la Vitraĵo.

La distra vespero staris en la signo de la 60a datreveno de la Karlrega Grupo Esperantista.

La la kategoria ĥoro "Amici Cantores" kun granda fervoro aŭdigis "La Espero(n)" kaj poste dum diversaj intermezoj, ĝi kantis esperante, angle, flandre kaj france. Belaj voĉoj, altnivela gvidado kaj aplaŭdo de la publiko kunhelpis al la kreado de festa atmosfero.

F-ino A. Orsolini, talentplene, plenumis la rolon de paroladistino kiu anoncis la diversajn erojn en la programo.

Projekciado de filmo "Bildoj pri la nigra Lando" montris, artoplene, neatenditajn belaĵojn en la forte industriita regiono de Charleroi kaj ĉirkaŭaĵoj. Same belaj estis la diapozitivoj pri la altfornejoj kaj la fandigo de la ŝtalo aŭ fero en feine brilegantaj lumefektoj aŭ pluvego de multkoloraj fajreroj.

Finfine ACEC-firmao prezentis filmon pri la aŭtomateco en ĝiaj pluraj aplikoj. Speciale notinde estas la komentario de la filmoj, flue kaj klare, en Esperanto dirita, de S-ro Roger Destabelle, aktiva elemento en la loka grupo! Gesamideanoj el Herstal prezentis amuzan skeĉon "Fuŝita Vespero", kiu multe vekis la plezuron de la publiko. Ĝin verkis S-ro Jean Pierard kiu ankaŭ aktoris kune kun Ges-roj Dujardin. Ili tute meritis la varman publikan aplaŭdon!

Dum intermezo S-ro M. Jaumotte, kiel estrarano de U.E.A., oficiale petis al S-ro Ralph Harry, ambasadoro de Aŭstralio en Bruselo kaj kiu ĉeestas la kongreson, akcepti la honoran membrecon de U.E.A. La konsento de la ambasadoro kaŭzis denove grandegan kaj longan aplaŭdon...

La unua kongresa tago finiĝis en vera festa sfero...

Dimanĉo. Post la Sankta Meso en Esperanto, okazis en la Laboruniversitato la ĝenerala jarkunveno de la Belga Esperanto-Federacio, kiun prezidis s-ro M. Jaumotte. La programo konsistis el du ĉefaj punktoj. Al la kunvenintoj estis antaŭmetita rezolucio, prezentita de

la prezidantaro. La aprobo estis unuanima. Tiun rezolucion mem oni legu aliloke en tiu-ĉi numero. Sekvis la honorigo de la grupo de Charleroi. Unue S-ro Paulus tre mallonge skizis historion, menciante kelkajn estintajn gvidantojn Poste S-ro Jaumotte elparolis la honorigan paroladon kiun sekvis la honorigaj mesaĝoj de multaj grupoj. Je tiu okazo fraŭlino A. Orsolini - la pivoto de la tuta esperanta aktiveco en la regiono de Charleroi - ricevis multajn donacojn... kaj multajn kisojn (!). Ankaŭ S-ino Paulus ricevis belajn florojn.

Poste ni rapidis (sed ne tro !) al la urbodomo kie okazis la solena akcepto. S-ro urbestro kaj s-ro provincestro senkulpigis sin. Reciprokaj alparoladoj tre laŭdaj kaj tre ĝentilaj de la skabeno kaj de nia ĝenerala prezidanto. Poste ni havis la okazon viziti la luksan urbdomon kaj ĝian malvastan, tamen interesan muzeon de pentraĵoj. Sekvis komuna manĝado libervola. Je la 15a ni denove estis kune por iri al Loverval viziti kulturcentron. Poste ni iris al granda restoracio kie estis ebleco por remboati, io kion precipe la ĝejnuloj el Brugge ege ŝatis kaj profitis. Reveninte en Charleroi, atendis nin la bankedo. Verdire estis ni kiuj atendis la bankedon, ĉar la restoracio kiu volis pretigi ĝin, estis akceptinta ankoraŭ alian festaranĝon. Do nia luksmanĝado komencis iom malfrue, sekve la posta balo ankaŭ.

Lundo. La suno tute ne aperis, ankaŭ ne por prilumi la procesion de St. Rolanda. Ĉu malgajeco de la naturo pro la fakto ke tiel malmultaj personoj venis por admiri tiun vere interesan folkloran feston ? Malgraŭ tio, kia unika okazo por fari diaojn ! La kuna manĝo en Ham-sur-Heure estis tre bone aranĝita. La vizito al la feŭda kastelo de Thy-le-Château kronis la kongreson. Ankaŭ tiu kongres-ero estis interesa. Tial kontente kaj kun ioma bedaŭro ni reiris ĉiuj al sia hejmo. Dankon, koran dankon al la georganizantoj - precipe al F-ino Orsolini - kiuj donis al ni tiujn belajn tagojn.

J.V. ; F.R. kaj P.B.



DELEGITARO ANTAŬ LA URBODOMO

REZOLUCIO DE LA KONGRESO DE B.E.F.

La BEF-anoj, kunvenintaj dum la 49-a Belga Kongreso en Karloreĝo,

TIMANTE, ke la implikaĵoj de la lingva problemo, kiu nuntempe malkvietigas la publikan opinion en Belgujo, havas rekte aŭ malrekte, nedezirindajn sekvojn interne de nia neŭtrala Federacio :

1. PETEGAS ĉiujn membrojn de BEF, ke ili plejble penadu tolereme interrilati inter si kaj nepre evitu, per siaj agoj, skriboj aŭ paroloj, krei penigan atmosferon inter la membroj, tutspeciale sur la tereno de la lingva problemo en la lando ;
2. SUGESTAS, ke ili kontraŭe ĉion faru por progresigi la harmonian kunlaboron inter Esperantistoj de ambaŭ lingvaj komunumoj ;
3. KONSILAS al ĉiuj membroj, kaj aparte al la Estraranoj, okaze de eventuala publika aludo al la rolo de Esperanto en la solvo de la belga lingva problemo kaj kiam eksplite ili ne parolas en sia persona nomo :
 - a) ke ili precizigu la sindetenon de BEF, neŭtrala asocio, por fari tiurilate ian ajn proponon ;
 - b) ke propagandcele ili laŭeble informu pri kio okazas en niaj kunvenoj (kongresoj, administraj kaj estraraj kunsidoj), kie nederlandlingvanoj kaj franclingvanoj ne konas lingvajn problemojn por interkompreniĝi ;
 - c) ke ili substreku la facilecon de Esperanto, kiu ebligas al personoj ne kapablaj lerni nacian lingvon, sufiĉe scipovi taŭgan interkomprenilon ;
 - d) ke, celante la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, ili povos emfazi la ĝeneralan valoron de Esperanto kiel pedagogia instrumento por lernado de aliaj lingvoj, inkluzive de la alia nacia lingvo ;
 - e) ke ili esprimu sian konvinkiĝon ke Esperanto triumfos, nur se ĝi estas ĝenerale uzata en la mondaj rilatoj, kion ni akcelas per la ĉiutaga aktiveco de UEA ;
4. APROBAS la intencon de la ŝuperaj instancoj de BEF, plejble baldaŭ pristudi eventualan modifon aŭ adaptigon de la organiza strukturo de BEF, surbaze de la supraj konsideroj.

FONDAĴO

M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Transpreno	118.441 F
S-ino Mention (Verviers)	500 F
Karloreĝa grupo	1.000 F
Kun danko.	119.941 F

Ensendojn por la julio - aŭgusta - septembra numero ni petas antaŭ la 20.8.1967

POR LA FERIOJ

Ekspozicio kaj konkurso sub la temo: **Kosmo kaj Infanoj.**

La Popola Astronomia Observatorio en la urbo ZILINA en Ĉeĥo-Slovakujo organizas, okaze de la dek-jara datreveno de la elpuŝo de la unua satelito, ekspozicion de infandeseĝnaĵoj pri tio kiel vidas la infanoj la kosmon. Iliaj ensendoj devos atingi la organizon je la 30a de julio. Premiitoj estos rekompencataj. Dorsflanke ĉiu desegnaĵo devas mencii kompletan adreson, nomojn, naskiĝdaton.

Adreso: Ludova hvesdaren mesta Ziliny; Zilina; Ĉeĥo-Slovakujo.

Dua Uzbekistana Esperantista Tendaro.

Tiu tendaro okazos de la 13a de aŭgusto ĝis la 25 de tiu monato. Estas la Esp. Komisiono de la Uzbecka Amikeca Societo kaj la Esp. Sekcio de la Taŝkenta Domo de Sciencistoj kiuj organizas tion duafoje pro la sukceso de la unua aranĝo. Loko: unu de la plej pitoreskaj montaraj regionoj de Uzbekistan, nome Hamzaabad, 60 Km. de la urbo Fergana. La tuta afero kostas 40 rublojn; inkluzive manĝojn, ekskursojn restodon en la tendoj kaj vojaĝon de Fergana al la tendejo. Estos somera universitato, paroladoj pri Sovjet-Unio kaj pri aliaj landoj kaj popoloj; koncerto kaj aliaj amuzadoj.

Adreso: Ing. Petro Poliŝĉuk; Novo-Moskovskaja 18, kv. 15; Taŝkent; Uzbekistan; Sovjet-Unio.

Intern. Ferlaĵ Kursoj en Helsingör, Danlando (23-30 julio)

Tiu jam famkonata kurso okazas jam dum pli ol 30 jaroj; kaj ĉiufoje partoprenas ĉirkaŭ cent personoj. Kie estas la tempo kiam ĉiujare partoprenis ankaŭ karavano de la Flandra Ligo?!

Denove oni vizitos la kastelon de Hamlet, Kronborg, konstruitan de la Meĥlenano Van Obberghen(!). Oni vizitos ankaŭ la Svedan urbon Hälsingborg je la alia flanko de la Sund.

Petu pliajn informojn ĉe L. Friis; Ingemannsvej 9; Aabyhøj; Danlando.

Eŭropa Junulara Konferenco en Enkhuizen (Nederlando). (19-29 Aŭg.)

Nederlanda kaj Germana Esp. Junularo (j) organizas tion kune, apud la bela Ejsellago. Estos ekskursoj al Rotterdam, al Alkmaar (fromaĝvendejo) al Frislando, ktp. Multaj prelegoj pri plej diversaj temoj. Filmoj.

Skribu al Wim Jansen, Röntgenstraat 32 A, Vlaardingen (telef. 010-341318) Ne pli ol 32 personoj povos partopreni.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

50a Jubilea Belga Kongreso 60-jara Jubileo de Brusela grupo

7-a Kongreso de B. E. J. A.

PENTEKOSTO 1968

BRUSELO

1/3.6.1968

LOKA KONGRESA KOMITATO:

Prezidanto: JACOBS René
Vic-Prezidanto: FIGHIERA Gian Carlo
Kasistino: ERNST Elfriede
Ekskursoj: NELIS Nadia
Festoj: JACOBS Rose
Loĝado: DEBAENE François
Komitatane: CASTEL Hector
Komitatanino: OPSOMER Simone

HONORA KOLONO:

- 01 — S-ro HARRY Ralph, Ambasadoro de Aŭstralio,
4, Bd Brand Whitlock, Bruxelles 4
- 02 — S-ro JAUMOTTE Maurice, 44, De Bruynlaan, Wilrijk
- 03 — S-ro JAUMOTTE Marguerite, same
- 04 — S-ro DEBROUWERE Gérard, 29, Magdalenastraat, Kortrijk
- 05 — S-ro DEBROUWERE Yvonne, same
- 06 — D-ro DENOEL Pol, 20, rue Victor Raskin, Liège
- 07 — S-ro DENOEL Dela, same
- 08 — S-ro DENOEL Serge, same
- 09 — S-ro JACOBS René, 94, rue Général Eenens, Bruxelles 3
- 10 — S-ro JACOBS Rose, same
- 11 — F-no JACOBS Jeannine, same
- 12 — S-ro FIGHIERA Gian Carlo, 13, rue de la Reinette, Bruxelles 1
- 13 — S-ro FIGHIERA Ada, same
- 14 — S-ro CASTEL Hector, 29, square du Centenaire, Ganshoren
- 15 — S-ro CASTEL Lucy, same
- 16 — F-no OPSOMER Simone, 24, av. Marnix (9^e ét.), Bruxelles 5
- 17 — S-ro BOFFEJON Hector, 95, Zegersdreef, Brasschaat
- 18 — S-ro BOFFEJON Annic, same
- 19 — F-no CHAINEUX Jeannine, 10, rue des Plantes, Verviers
- 20 — S-ro COUWENBERG François, 41, Koninginnelaan, Blankenberge
- 21 — S-ro COUWENBERG Albine, same
- 22 — F-no DE COCK Palmyre, 19, Val de Saedeleerstraat, Aalst
- 23 — S-ro DE HONDT Jeanne, 7, Zamenhofstraat, Antwerpen
- 24 — S-ro DE KEGEL Robert, 5, place des Tramways, Charleroi
- 25 — S-ro DE VLEESCHAUWER Engelbert, 69, Gebroeders Tassestraat
Wijgmaal - Herent
- 26 — S-ro DE VLEESCHAUWER Adrien, same
- 27 — S-ro DURWAEL Ivo, 35, Lode Brionstraat, Wilrijk
- 28 — S-ro DURWAEL Clara, same
- 29 — F-no GEERS Blanche, 7, Grote Beerstraat, Antwerpen

- 30 — S-no GUILBERT Lucy, 11, rue Beulvin, Reux
 31 — F-no HENQUINEZ Marie-Thérèse 1171, St.-Maartensdal, Leuven
 32 — S-ro HOLVOET Georges, 8, rue Jules Botillon, Bruxelles 5
 33 — S-ro LERNOUT Jozef, same
 34 — S-ro LERNOUT Ernest, same
 35 — S-no MENTION Marguerite, 10, rue des Plantes, Verviers
 36 — S-no MEURRENS Anna, 78, Naamsestraat, Leuven
 37 — F-no ORSOLINI Andrée, 6, rue Paul Pastur, Charleroi
 38 — S-ro PAESMANS Eugeen, 64, Koepoortstraat, Antwerpen
 39 — S-ro PAULUS Raymond, 73, rue de Montigny, Charleroi
 40 — S-no PAULUS Gaby, same
 41 — F-no PEETERS Clara, 68, Onderwijsstraat, Antwerpen
 42 — S-ro POUPEYE Charles, 11, Elf Julistraat, Brugge
 43 — S-ino POUPEYE G., same
 44 — F-no POUPEYE Yvonne, same
 45 — S-no RENNOIR Gilberte, 100, rue du Roten, Charleroi
 46 — F-no SAELEMAKERS Marie-Guillemine, 45, Vital de Cesterstraat, Leuven
 47 — S-no SCHAYES Emilia, 337, Sint Maartensdal, Leuven
 48 — S-ro SCHELLEKENS François, 44, Frans Hensstraat, Antwerpen
 49 — F-no TERRIJN Juliette, 72, Raapstraat, Gent
 50 — S-ro VANDERLINDEN Maurice, 44, Dorpsstraat, Astene-Deinze
 51 — S-ro VAN HUMBEECK Blanche, 9, Waterhoenstraat, Antwerpen
 52 — S-no VERMUYTEN Blanche, 9, Waterhoenstraat, Antwerpen
 53 — S-ro VERSTRAETEN Jules, 1078, St.-Bernardsesteenweg, Hoboken

ALIGO:

Por aliĝi, bonvolu ĝiri vian kotizon (100 Fr. aŭ 50 Fr.) al P.ĉ.K. n° 19.17.99 de S-ino ERNST Elfriede, kasistino, 89, avenue du Sacré-Cœur, Bruxelles 9. Dorsflanke, metu klare viajn nomon, antaŭnomon, kompletan adreson kaj celon de la pago: 50-a Belga Kongreso.

Antaŭdankon!
 Unuaj informoj

La subaj sciigoj estas provizoraj. La Brusela Kongresa Komitato rezervas al si la rajton modifi ilin laŭnecese.

Kongresejo. La kongresaj laboroj okazos en la « Eŭropa Domo », kiu jam gastigis la Antaŭkongreson en 1963. Ĝi situas apud la Belarta Palaco, je cento da metroj de la Centra Stacidomo.

Loĝado. La kongresanoj povos elekti inter komuna loĝejo (la nova naturamika domo « Fraternité ») kaj kelkaj malmultekostaj hoteloj. Laŭ deziro, la Kongresa Komitato zorgos ankaŭ loĝadon en unuaklasaj hoteloj.

Ekskursoj. Estas antaŭviditaj vizito al la Belga Radio, trarigado tra la Muzeo de Manneken Pis kaj ekskurso al la kastelo de Bouchout (XI-a jarcento).

Kotizoj. Belgaj kongresanoj pagas kotizon de 100,— fr. Familianoj kaj gejunuloj 50,— fr. Eksterlandaj kongresanoj ne devas pagi kotizon.

Honorgasto. La Brusela Kongresa Komitato invitis S-anon Titov, malnovan esperantiston kaj patron de la dua kosmonaŭto, esti honorgasto de la kongreso. Liaj veturkostoj estos pagitaj de okcidentaj esperantistoj.

Provizora programo. SABATE. Alveno de la kongresanoj. 13-a h. malfermo de la ĝiĉetoj kaj disdono de la dokumentoj; 16-a h. Malfermo de la Kongreso kaj festa ceremonio okaze de la Jubileo de la Brusela Grupo; 19,30 h. gazetara konferenco; 20-a h. arta vespero (nur profesiaj aŭ duon-profesiaj artistoj) kaj akcepto ĉe la Teraso Martini, 29-a etaĝo de la samnoma nubskrapulo en la centro de Bruselo. DIMANĈE. Diservoj. 10-a h. oficiala laborkunsido de BEF; 12-a h. akcepto kun regalo ĉe la Urbodomo sur la Granda Placo; 13-a komuna foto; 16-a h. vizito al la radio kaj al la Muzeo de Manneken Pis; 19,30 h. bankedo kaj balo; LUNDE. 10-a h. Libervola ekskurso al la Kastelo de Gaesbeek, tagmanĝo sur la teraso de la Restoracio « Orangerie » en Meise, libervola promenado en la parko de la Kastelo de Bouchout, kie mortis la imperiestrino Charlotte, eventuala libervola vizito al la Botanika ĝardeno.

ROTTERDAM ANSTATAŬ TEL - AVIV

Pro la tragika evoluo de la eventoj en la Meza Oriento, la Estraro de UEA unuanime konstatis, ke la 52-a Universala Kongreso de Esperanto bedaŭrinde ne povos okazi en Tel Aviv. Ĝi esperas tamen, ke en iu proksima jaro U.K. en Israelo povos realiĝi.

En la nova situacio la Estraro decidis, ke la 52-a Universala Kongreso okazu en Rotterdam de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto, 1967. La programo, fiksitaj tagordoj, diversaj kulturaj kaj distraĵaj aranĝoj estos esence la samaj, sed verŝajne eĉ novaj eroj estos aldonitaj. La Kongreso okazos en la perfekte taŭgaj luksaj salonoj de la ĵus konstruita Koncert- kaj Kongrespalaco De Doelen. La urbaj aŭtoritatoj kaj la turisma servo de Rotterdam donos plenan helpon.

Pro la eksterordinaraj cirkonstancoj, la Kongreso estos organizata rekte Aligperiodo ĝis la 15-a de julio laŭ la favoraj kotizoj, por membro-abonanto de UEA: 57,— gld., por nemembroj 77,— gld. Tiuj kiuj, aliĝintaj post 31.3.67 jam pagis la pli altan kotizon, ricevos la diferencon en sia kredito. Ĉiujn detalojn en ligo kun la ŝanĝo de la kongresurbo komunikos la C.O. de UEA en Rotterdam.

Kompreneble, la aliĝoj faritaj por Tel-Aviv, validas nun por Rotterdam. La personoj, kiuj pro kiu ajn kaŭzo ne povas ĉeesti la Kongreson, povas tamen helpi per aliĝo laŭ la normala kotizo, aŭ almenaŭ per la t.n. simbola aliĝo, por kiu la kotizo estas nur 25 gld.

KOMUNIKO DE LA CENTRA OFICEJO

Ĉiuj mendoj kaj pagoj por la 52-a Universala Kongreso de Esperanto restas validaj. Loĝado, ekskursoj, bankedo estos aranĝitaj laŭ la mendoj. La prezoj estas la samaj aŭ iom pli favoraj. Belega tuttaga ekskurso tra sufiĉe nekonata regiono estas preparata. Ĉiuj aliĝintoj ricevos apartan informon.

Nekrologo

† Julio BAGHY (13-1-1891 - 18-3-1967)

Guste post presigo de nia antaŭa numero atingis nin la konsterniga novaĵo ke nia granda poeto el Budapeŝto, Julio Baghy, mortis. Li estis la enkarniĝinta esperantismo. Plie, li estis artisto diversflanka. Poeto. Poeto en la vere alta signifo de la vorto. Liaj poemoj estas veraj poemoj kaj ne rimajoj. Ili fontis el la interna deo diri ion al la homoj, porti mesaĝon al la homoj, kaj ne el la vanta deziro foje ion (banalan) enrimigi. Tiu homo ŝategis la vivon; sed la vivo estis tro ofte doloriga por li. Li estis en militkaptiteco en Siberio! Tiuj dolorplenaj periodoj servis la arton; ĉar naskis poemojn kaj poeziplenajn prozaĵojn. Tiuj periodoj ankaŭ profundigis la homon Baghy, tiel ke el tiu profundo estiĝis profetecaj verkoj. Per tiuj verkoj li farigis al si statuon "aere perennius", pli eterna ol bronzo. Ni en danko citu tie-ĉi liajn ĉefajn verkojn: Preter la Vivo - Viktimoj - Pilgrimoj - Dancu, Marionetoj - Migranta Plumo - Hura - Printempo en la Aŭtuno - La Vagabondo kantas - Verdaj Donkiĥotoj - Sur Sanga Tero - Songe sub Pomarbo - kaj la lasta, "Ĉielarko" kiu ni recenzas en tiu-ĉi numero.

Geesperantistoj ĉiuj, lasu vin inspiri de J. Baghy, post lia morto kiel antaŭ ĝi. Por eterne li estas unu de la gvidantoj de la homaro sur la vojo al pli feliĉa estonteco. Li luktis la bonan lukton!

La Red.

Bibliografio

Lakshmiwar Sinha: "Jaroj sur Tero" Eldona societo Esperanto en Malmö. 128 paĝoj. Prezo broŝ. 12 Sved. kronoj; bind. 16. Kun enkonduko de Prof. Dr. Björn Collinder.

En tiu libro, la nun 62 jara Hinda esperantisto, Lakshmiwar Sinha - jam bone konata pro liaj verkoj "Bengalaj Fabeloj"; "Hindo rigardas Svedlandon" kaj per traduko de kolekto da rakontoj de Rabindranath Tahore, sub titolo "Malsata Ŝtono" - resumas tre (tro) mallonge sian vivon. Preskaŭ senbezone diri ke oni legas la libron kun granda interesiĝo. La legadon pliagrabiligas la bela aspekto de la libro, la ilustraĵoj, la bonaj papero kaj litertipo, kaj ankaŭ la fakto ke troviĝas nur du preseraroj kaj unu forgeso de pluralo. La iom alta prezo estas la alia flanko de la bela medalo.

Dum legado leviĝis ĉe ni du demandoj.

- 1) Kiam la aŭtoro restadis en Svedujo, tiu lando faris je li impreson de ia ĉielo sur tero. Ĉu li neniam pensis pri enketado rilate al la idealoj kiujn la Svedoj ankoraŭ havas, kaj al la taskoj kiujn ili pensas plenumendaj? Okazas ja fenomenoj kiuj ne atestas precize pri feliĉo kaj kontenteco.
- 2) Sur p. 89 oni legas ke la verkisto pensas pri revivigo de la hejma industrio en Hindujo. La taktiko estis certe bonega por kontraŭbatali la Anglan ekonomian superregon. Sed poste? Ĉu tio ne signifus provon por kontraŭdirekti la evoluon al reaj Mezepokaj situacioj, kiuj estus neblaj kaj malavantaĝaj.

Pri du aferoj ni esperis trovi pli da informoj.

- 1) Pri la starigo de la Esperanto-Domo apud Santiniketan, kun ĝia celo ktp. (foto de tiu domo apud p. 81)
- 2) Je tiel grava evento kiel la mortigo de Gandhi (p. 111), oni dezirus ankaŭ pli da informoj kaj da komentario flanke de persono kiu havis kontaktojn kun gvidantoj de la Hinda popolo, kiel R. Tagore kaj aliaj.

Je fino de la libro troviĝas ampleksa listo de klarigitaj Hindaj vortoj kaj titoloj. Tre valora helpo kiam oni legas literaturon pri tiu lando. Ĉar ne malofte tiaj vortoj abundas... sen klarigoj.

Drs. F. Roose

Heinrich Frless "Ĉiuj formoj de la pasivo". Eldono de la aŭtoro mem en paĝa formato. Prezo 1 GMK. aŭ 3 steloj aŭ 2 resp. kup.

Mendi ĉe adreso: Sudetenstrasse 6; 6407 SCHLITZ; Germ. Feder. Resp.

Mi, kiu pensis ke eble estus finita la serio de publikaĵoj pri tiu -ita, -ata problemoj! Kaj tamen la broŝuro estas interesa! La aŭtoro defendas per bonaj argumentoj la atisman starpunkton. Li alprenis i.a. argumenton kiun ni mem siatempe defendis, nome ke la verboj havas en si la nocion de finiteco. Interesa estas lia rimarko ke la participo, estante a-vorto, ne montras agon sed staton. Lian pluan dedukton ni ne povas tekste remeti tie-ĉi. Ankaŭ estas interesa alia rimarko: se Zamenhof estis konscia pri iu aspekta flanko de esp. verboj, ke li certe estus metinta tion en la fundamento. Aliaj argumentoj estis troveblaj en antaŭaj verkoj jam. La broŝuro legiĝas facile, kaj ne estas longa! Ni certe rekomendas ĝin.

Teo Jung: "La Esperanta Konjugacio". Du partoj. Entute 245 paĝoj. Eldonita kiel manuskripto de "Heroldo de Esperanto" en Scheveningen en 1965-66.

Kiam mi estis leginta la verkon, mi preskaŭ emis nomi ĝin Benediktana laboro! Imagu ke la aŭtoro traserĉis en 14 Zamenhofaj verkoj 10.300 participajn tempoformojn kaj pristudis ilin! Jen la rezultato de la studo. Ĝi estas destinita al tiuj kiuj havas (ankoraŭ) interesigon pri la problemoj -ata, -ita. Ni ne plu ripetos en kio ĝi konsistas. Se necese, legu en nia antaŭa numero la recenzon pri la verko de Dr. K. Kalocsay. Kiam la aŭtoro diras en la enkonduko ke Zamenhof ne protestis kontraŭ uzoj aliaj ol liaj, ni tamen devas atentigi ke li kondamnis la klarigon de la Germano Meier pri la pasivaj participoj. Kaj kiam li diras ke en la tuta ekzercaro ne troviĝas ĉe unu sola formo devia (p. 10), ni devas diri ke almenaŭ unu frazo indikas nekontesteble ke Z. komprenis finitecon en la uzo de -estis -ita. Nome la frazo: Li malbenis la tagon en kiu li estis naskita. Sed tute prave T.J. montras ke fojfoje Z. ne estis konsekvenca. Prenu ekzemplon 246 sur p. 69: "Se vi povus ricevi lin kiel edzon, tiam vi estus bonege prizorgita". Certe Z. volis diri ke la prizorgado ankoraŭ daŭrus; kaj li uzis -ita. (!); ĉu do finiteco? Sur p. 161 mi denove ne povas aprobi la rezonadon de T.J. Li diras: "Kalocsay kaj Waringhien ne hezitas malaprobi Zamenhofon kaj aprobi formojn ne-Zamenhofajn... se ŝajnas al ili pli logikaj... kaj la Zamenhofan uzadon... en la lastaj verkoj... ili deklaras eraroj... kvankam neniam regulo de la fundamento kontraŭ staras tian uzon". Ne tio estas la problemoj! Ĉiujn erarojn de Z. oni povas kondamni, kondiĉe ke ili ne troviĝas en la fundamento. Same, kelkaj linioj pli sube: "La samaj K. kaj W. enkondukis... novajn regulojn... bazitajn sur esceptaj ekzemploj de la majstro". Mi kontraŭdiras: jes, sed ekzemploj en la fundamento! Sed, tiuj du aŭtoroj ne akcentas la nekonskvencon de Zamenhof! Kaj, pli grava afero(!): se en ĉiuj kazoj ni uzus la aspektan sistemon kiel K. kaj W., tiam ni venus al frazoj kiuj estus sensencaj, kaj ĉe stultaj. Tion T.J. pli ol sufiĉe montris. En tio lasta Jung tute pravus. Li ankaŭ pravus kiam li predikas toleremon en tiu afero. Ni devas ankaŭ diri ke plej ofte la rezonado de Jung estas la logiko mem. Ekz. sur p. 165. Sur la sekvanta p. 166, Jung estus povinta aldoni post linio 18: "... kaj malfacilega! Antaŭ ol uzi iun verbon oni devus bone pripensi kia verbo ĝi estas por povi apliki la regulojn de W.. Tie kie T.J. (sur p. 184) parolas pri enkonduko de kutimoj propraj al iuj naciaj lingvoj, mi devas gustigi tiun aserton kaj diri ke Zamenhof ne enkondukis ilin. Sed, ĉe uzo de -ita, Z. havis la ideon de finiteco; kaj Waringhien atentigis pri tio. Li plu atentigas: se ni uzas -ita, la Slavioj havas impreson de finiteco; kaj ĉe uzo de -ata, la impreson de plua daŭro. La eraro nun konsistas en tio-ĉi ke kelkaj volas dekreti tiun komprenmanieron kiel gramatikan leĝon. En tre multaj kazoj oni povas egale uzi ambaŭ participojn. Kiel facile oni povas esti nekonskvenca en sia severa sinteno rilate tempon kaj aspekton, tion montras ekz. 822 sur p. 186. Ŝajnas al mi ke T.J. mem ne estas konsekvenca tie. Tute prave J. atentigas pri la malforta punkto de la "aspektuloj": en ilia sistemo -ita povas signifi du diversajn tempojn. (p. 216) Ni kredas ke post tiu giganta laboro oni sufiĉe traserĉis la Zamenhofan koncepton pri la signifo de la de li uzitaj participoj. Ni kredas ankaŭ ke Z. mem ne konsciis ke ekzistis ia problemoj. Fine, ni kredas ke la konstanta uzo de la esperantistaro, precipe de tiuj kiuj havas lingvan senton, finfine solvos tion kion nek dekretoj, nek pamfletoj nek polemik (ist) oj kapablas solvi. Sed post ĉio kion oni asertis pri tiu afero, la laboro de T. iĝis necesaĵo. Dankon al li ke li plenumis tiun grandegan taskon.

Drs. F. Roose

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (Sro Iserentant R.) Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140

Prof. D-ro Ivo Lapenna : "Elektilaj Paroladoj kaj Prelegoj" 152 paĝoj. Eldono de la aŭtoro. Rotterdam 1966. Prezo : 11 guldenoj.

Okazas ofte ke ni rekomendas esperantan libron. Tiam ni aldonas al kiuj homoj speciale ni rekomendas ĝin : literaturistoj, aŭ aliaj. Tiun ĉi libron ni devas tre forte rekomendi al ĉiuj geesperantistoj. La paroladoj estas modelo de stilo kaj de lingvo. Ĝi atestas pri tre granda oratora talento ; cetere, kiel ni konas Lapenna, Preskaŭ ĉiuj partoj, senescepte, meritis lokon en antologio de retoriko. Sed antaŭ ĉio estas por io alia ke la verko tiel plaĉas al ni. Ĝi estas tiel riĉa kolekto da trafaj argumentoj por nia afero ! Ĝi estas ankaŭ tiel ideoriĉa ! Kaj ĝi ne estas limigita al strikte nia esperantoteren. Ĝi enhavas konsiderojn ĝeneral-historiajn ege interesajn kaj pruvantajn pri granda pensa penetra povo de la aŭtoro. Tiurilate la kongresa parolado de Bruselo estas elstera. La legado de tiuj ĉapitroj vere multe pliriĉigas nin per faktoj, ideoj kaj rezonadoj. La grupoj devus legi kaj komentarii partojn el ili dum iuj grupokunvenoj. Ni, esperantistoj, mem ne sufiĉe koscias kiom prema iĝis la lingva problemo en la internaciaj rilatoj. Do, ni legu la konceman ĉapitron ; kaj ni plene konsciigos. Ĝi estas unu de la plej legendaj. Se iam ajn, tiam nepre nun ni diru : "tolle et lege" = prenu kaj legu.

Hideo Haga : "Filoj de Dio, Adorantoj de Dio". Eldono de Tensei-ŝa ; en Kameoka, Kyoto-hu. Jaro 1963. Prezo : 5 Us. Dolaroj.

Estas la tria fojo ke mi prenas Japanan-esperantan libron en mano (post la "Enciklopedieto" kaj la "Libro de Teo") kaj triafoje mi estas ravita. Ĝi estas foto-albumo kaj dulingvaj tekstoj, kiuj prezentas la religion "Oomoto". Tiu religio estas unu de la plej simpatiaj, ĉar ĝi ne nur predikas anon, sed ankaŭ praktikas ĝin. Plie, ĝi ne estas religio kiu per armiloj estas disvastigata ; kaj ĝi estas ankaŭ tute ne fanatikeca. Kiom da religioj povas fieri posedi tiajn altajn moralajn kvalitojn ? Estas konate ke tiu religio faras multe por Esperanto en Japanujo ; kiu cetere estas tute en la linio de ĝia strebado de universala amo. La fotoj montras la sanktejojn de Comoto (kiam mi rigardis al la dufrontona supro de Mirokudenpreĝejo, mi havis impreson ke el ĝi radias sama spirito kiel el niaj gotikaj katedraloj) ; ĝiajn gegvidantojn, misiistojn, laborojn, statuojn kaj manifestaciojn. Kelkaj fotoj montras la al ni per la revuo « Oomoto » bone konatan uta-feston. Ĉiuj fotoj estas tre belaj, kaj multaj estas poeziplenaj. Poste venas, en Japana kaj Esperanto lingvoj, klarigaj tekstoj de la gegvidantoj, pri la esenco de la religio ; kun biografiaj notoj pri la aŭtoroj. Onisabro Deguĉi instruas al ni ke la korpo estas la templo de Dio (p. 262) Al Katolikoj kiuj ricevis sian edukon en katolika lernejo, tiu eldiro estas tute ne fremda ; la saman ili eklernis.

Mi havas tamen tre gravan rimarkon. O. Deguĉi ne donas kontentigan respondon al la prava demando : « ... kial mi nun ne memoras, kiel mi vivis la antaŭan vivon en la spirita mondo kaj kiamaniere mi renaskiĝis ĉi tien ? Cetere, se tia eterneco de la vivo ekzistus, kial la homo bezonus tiel timi kaj abomeni la morton ? » (p. 263). Ĝi estas unu de la ĉion superantaj demandoj de la mistero, vivo, kaj mi scivolis kiun respondon al tio donas la Oomoto-religio.

Sumiko Deguĉi prirakontas parton de sia karcera vivo (ja, tiu religio estis ankaŭ persekutata !).

Kaj kiam li parolas pri tiuj blatoj, ni vole-nevole pensas pri nia sankta Francisko de Assisi, kiu ankaŭ havis tian amon al la bestoj. De Hidemaro Deguĉi troviĝas tre trafa moralinstrua rakonto « Bonzo Ikkju » ; kaj lia scenaĵo « La Vendisto de Okuloj » estas tre ĉarma (sed ne estas dramo !). Pro spacomanko mi devas tie-ĉi fini la recenzon kvankam mi bone konscias ke mi tute ne sufiĉe reliefigis ĉion belan kaj ĉion saĝan kio troviĝas en tiu grandformata kaj preskaŭ lukse eldonita libro.

Drs. F. ROOSE.

Julio Baghy : "Cielarko" 112 paĝoj. Eldonis "Stafeto" de la Kanariaj Insuloj en la serlo de la Beletraj Kajeroj (malgranda formato). 1967. Prezo : 1.20 Us. Dolaroj.

En tiu-ĉi verko la aŭtoro verse reverkis dekdu fabelojn el dekdu landoj. En antaŭparolo li klarigas kiel li procedis. Li tute ne tradukis. Li aŭdis rakonti aŭ li legis ie pri ili, kaj mem reverkis.

Do la temoj estas donitaj ; sed la verkado estas originala. Tiamaniere li foje "aldonis" ion kio ne estas laŭ la spirito de la fabelo. Ekzemple en la Gruza fabelo, la drako intencas iĝi vegetarano. Tio estas tutsimple ŝerco de J.B. Sed li misfaris en la fino de tiu fabelo. Efektive la fino detruas la etoson de la fabelo. En la antaŭ-parolo li klarigas : "...pro troa naivo... mi ion sarkasme... donis grimacan finon". En tio la aŭtoro eraris. Kelkfoje (ne ĉiam) la fabeloj havas tre profundan saĝon. La profunda saĝo en tiu-ĉi estas ke amo kaj bono estas la du plej grandaj fortoj. Kondiĉe, kompreneble, ke ili estu... sufiĉe fortaj ! Amo, kiel ekzemple havis sankta Francisko de Assisi, estis tiel forta ke neniu alia forto povis kontraŭstari ĝin. Tial la Gruza fabelo estas signifoplena ! Mi havas ankoraŭ unu malgravan riproĉon, nome ke malgraŭ postkorekto sur p. 110, enŝteliĝis ankoraŭ kelkaj eraroj. Ekz. sur p. 93 ne temas pri bankbileto sed pri bankbileto ! Sur p. 105 depedas devas esti dependas, Troviĝas ankoraŭ sur p. 71 rigidino, kaj sur p. 75 tumentis. Krom tiuj du punktoj, nur laŭdego pri la libro. Ĝi estas vera juvelo ! Ordinarc fabeloj estas agrabla legaĵo. Sed kiom pli kiam ili estas reverkitaj de J. Baghy. Ni admiras la nekredoblan virtuozecon en la aliteracio de la "Sagaca Knabino" ; cetere tre agrabla fabelo. La Estona peco, "Knabinoj de Muĥu" estas kvazaŭ Greka klasika/tragika epopeo. La Rusa "Pigra Petro" rakontas en agrabla maniero, kiel oni valorakses nur tion kion oni per streĉa laboro akiris. La Hinda "Mahadeva kaj la unua Virino" estas tre komika... kaj ankaŭ instrua pri virinsikologio ?? ! Ĝi jam aperis antaŭ tempo en "Heroldo". Mi jam diris ke kelkfoje li priverkis temon. Nu ankaŭ en la oriento kelkaj temoj estis internaciaj. Ekzemple la temo de la vana fuĝo for de la morto. Tion ni trovas ĉi-tie en la Turka fabelo ; dum ni konas ĝin en Persa versio fare de la Nederlanda poeto P.N. Van Eyck en "De Tuinman en de Dood" (la ĝardenisto kaj la morto). Kara leganto, rapidu aĉeti tiun malmultekostan libron. Ekzistas nur mil ekzempleroj. Kaj vi tre ĝuos ĝin.

Drs. F. ROOSE

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODEN
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Filmo de Acec

Kolorfilmo "POTENCECO kaj AUTOMATECO"
projekciita dum la Distra Vespero de la 49a Belga Kongreso.

Per tiu realigo, la uzinoj ACEC ĉasis nenium specialan celon, reklaman aŭ dokumentan, sed ili provis kontribui al la pluigo de la prestiĝo de ACEC donante al la vidantoj impreson de la potenco kaj de la alta teknikeco atingitaj de tiu societo en siaj realigoj. Tiucele, la temo "Automatismo" estis longe uzita.

Por sentigi tiun impreson, la realiganto — unu el la plej famkonataj en Belgio — kiu kontribuis al tiu laboro, ĉefe prizorgis la kinan kvaliton de la bildoj, apogante ilin per elvoka sonizado kaj uzante la komentadon nur kiel kondukĉenon de la bildsinsekvado kaj ne kiel klarigantan teknikan tekston.

Post bilda kaj sonora elvoko de la elektronikaj teknikoj kaj de la automatismo, la filmo rapide montras kelkajn potencajn produktrimedojn uzitajn en la konstruado de materialoj elektraj, elektronikaj kaj nukleaj, sed ĝi insistas pri serio de realigaĵoj, inter kiuj iuj profunde aŭtomatigitaj, elektitaj) el la plejparto de la industriaj kaj esploraj sferoj. Tiu emfazo metita sur la realigaĵoj estas intenco, ĉar la realigaĵoj interesas kaj konvinkas la konkurantaj klientojn.

Ni substreku ke tiu filmo trafis la premion de la industria filmo ĉe la 7a festivalo de la belga filmo en Antverpeno en novembro 66a, kie, inter 184 belgaj filmoj proponitaj, nur 84 estis akceptitaj de la antaŭselekto.

La Belga Ministerio de la Eksterlandaj Aferoj demandis kopion de ĝi por esti projekciata dum la tuta daŭro de la internacia Ekspozicio de Montrealo, en Kanado.

Tradukis Destabelle R.
Karlrega Grupo Esperantista.

Europa Esperanto Kongreso
23. - 30.7.1967, Innsbruck

Vieno, 11.5.1967
Fünfhausgasse 16
A-1150, Wien

Novaj informoj:

1. **D-ro Wilhelm Herrmann** parolos la 25-an de julio 1967 en la festsalonego de EEK pri la temo: "Psikologia integracio helpe de internacia lingvo".
2. **Amatora radiostacio** dissendos ĉiutage informojn pri Esperanto. Organizanto: Rudolf Bartosch, OE 3 RU, Gross-Siegharts, Aŭstrio.
3. **La urbestro de Wörgl akceptos** la 28-an de julio 1967 la kongresanojn ĉe la unua Zamenhofmonumento en Aŭstrio.
4. **Tirola Vespero:** Altkvalita unuaranga aktoraro prezentos folkloran programon laŭ komisiono de la Aŭstria Instruministerio.
5. **Specialaj aŭtobusoj** servas por la veturado inter la hoteloj kaj la Olimpia Festsalonego.
6. **Propra bankĉeketo** en la kongresejo helpas al komforta monŝanĝo.
7. **Eĉ pli ol Eŭropa Esperanto-Kongreso!** Ĝis nun anoncis sin gesamideanoj el jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Britujo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kanado, Nederlando, Norvegujo, Nov-Zelando, Pollando, Sovet-Unio, Svedujo, Svislando, Usono, kvankam UEA ĝis nun bedaŭrinde forĝis raportojn pri EEK kaj ne plu mencias la Eŭropan Esperanto-Kongreson 1967, Innsbruck-Aŭstrio, en la kongresa kalendaro de Revuo Esperanto.

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"
Kunsidoj: Ciuvendrede en Brasserie "Capitole", Gemeentestraat, 15 Antwerpen je la 20, 15a horo.
Poŝtĉeknumero: 726.54, La Verda Stelo Deurne.

La 31an de marto S-ro R. Balleux organizis amuzan, distran vesperon kiu havis neatenditan sukceson. S-ro I. Durwael, por la unua fojo, prezidis la kunsidon ĉar S-ro Jaumotte estis malhelpata.

La 7an de aprilo oni ĝuis la prezentadon de pulĉinela teatraĵeto "Neus de Schavies" en la fama kaj artoplana antverpena "Poppen-schouwburg Van Campen". Oni konkludis tiun vesperon agrable kunstante en apuda kafejo.

La 14an, pro la 50an datreveno de la morto de D-ro Zamenhof, S-ro J. Verstraeten laŭlegis artikolon de Adamo Zamenhof pri "Rememoroj pri la lastaj Jaroj de mia Patro", kiu troviĝas en la belega "Memorlibro pri la Zamenhofjaro". Dum alia parto de l' vespero S-ro R. Van Humbeek pritraktis "Doganaĵ(n) Aferoj(n) kaj Turismo(n)" kie li (profesia doganisto) detale priparolis kio, jes aŭ ne, estas permesata kunporti en aŭ el la lando kiam oni vojaĝas; temo kiu multe interesis, precipe nun je la sojlo de la libertempo.

Dimanĉon, la 16-an, dum belega suna vetero, la vizito al la Plantin-Moretus-muzeo, kun Esperanto-komentario pere de magnetofono, ne havis la atenditan sukceson. Tamen la vizitantoj multe ĝuis la rondiradon.

La 21an la anoncita parolado de S-ro G.C. Fighiera (malhelpata en la eksterlando) estis anstataŭata per distra programo kiun F-ino A. Geelen, talentplene, prizorgis kun granda etuziasmo kaj pri kiu la ĉeestantoj konservis, sendube, pli ol agrablan memoron.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel.: 16.89.92 Entrepreno de

KONSTRŬAJOJ

**GRUPA
VIVADO**

La 28an F-ino A. Enzlin prezentis sian kolorfilmon pri "Budapest", kiun ŝi verkis dum sia vizito al la Universala Kongreso en 1966 kaj kiun multaj ĉeestantoj ree pripensas kun melankolio! Dum la 2a parto de l' vespero S-ro Jo Haazen aŭdigis al ni muzikaĵon de Peter Tsai-kovskij, kiun li komentis laŭ sentoplena maniero.

La 5an de majo F-ino Math. Hofkens paroladis pri "Toulouse Lautrec", kies vivon ŝi grandlinie priskribis kaj substrekis per montrado de belegaj lumbildoj. Entute: lerniga vespero kiun oni ĝuis 100% pro la klara lingvo kaj la bonega prononcado!

Dimanĉon, la 7-an, en la kadro de E.K.I.-Antverpeno (Esperanto-Komitato Intergrupa) vizito estis organizata al muzeo en Berchem. Estas muzeo pri prahistoriaj elfosaĵoj kiujn oni trovis dum la konstruado de la "Malgranda Ringo" ĉirkaŭ Antverpeno. Tiu ringo konsistas, grandparte, el aŭtovojo kuŝanta ± 8 metrojn en la tero. Oni elfosis ostojn kiuj datumas de ± 8 milionoj da jaroj kaj kiuj havas konsekvence grandegan historian valoron! S-ro Wim De Smet el Overijse vigle interesiĝas pri ĉio tio. S-ro J. Foquet, iniciatanto kaj gvidanto de la muzeo, tion klarigis al la EKI-anoj kaj eĉ refreŝigis la memoron dum sia eksplikado pri la ekesto de nia tero kaj ĝia evoluo tra la jarmiloj. S-ro R. Van Eynde, kiel Vicprezidanto de EKI, dankis la gvidanton, S-ro Foquet.

La 12an S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn inter kiuj "De Parizo al la Baska lando" estis esperantigita. Bela turisma filmo, en koloroj, kaj verkita laŭ agrabla maniero, ĝi donis al F-ino Bl. Geers la eblecon traduki la tekston kaj al F-ino A. Geelen kaj S-ro R. Van Humbeek ĝin paroli. Kiel kutime S-ro J. Montmirail respondecis pri la teknika parto.

La 13an, la 14an kaj la 15an 22 verdstelanaj partoprenis al la 49a Belga Esperanto-kongreso en Charleroi.

manufakturajo ĉefo DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
por la eleganta sinjorino
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87 Leysstraat 10
Arlon	: 12 Marché-aux-Légumes
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Anspachlaan 194 Oude Kleerkoperstr. 31
Gent	: Brabantdam 21
Herstal	: 4 Rue Large Voie
Leuven	: Bondgenotenlaan 13
La Louvière	: 16 rue Albert 1er
Luxembourg	: 67 Place de la Gare
Mechelen	: IJzeren Leen 32
Oostende	: Kapelstraat 23
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: 75 Rue Royale
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: 2 Pont St. Laurent
Wetteren	: Jos. Buyssestr. 39-a